NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto Liceo Februaro 1986

## UNESCO akceptas novan resolucion pri Esperanto

Mejloŝtono povas esti konsiderata la resolucio de Unesco, alprenita de la Ĝenerala Asembleo, kunveninta en Sofio la 8-an de novembro 1985. Inter alie, ĝi agnoskas la progresojn de Esperanto kaj ĝian kontribuon al la internacia interkompreniĝo: Krome, la resolucio invitas la Ŝtatojn-Membrojn de Unesco aliĝi al la tutmonda celebrado de la centjara datreveno de Esperanto.

## VIVO DE LA LICEO

Klubo de literatur-amantoj.- Personoj, kiuj pretas antaŭ pagi 2.200 pesetojn por poste ricevi 4 titolojn de la jubilea literatura serio "Hispana Literaturo", bonvolu certigi tion al Jorge Camacho. c/ Chantada 43, 1-J. 28035 Madrid. La unua titolo "La familio de "Pascual Duarte" troviĝas ekster ĉi tiu oferto. Autoroj, kies totoloj aperos en tiu serio: Ana Mª Matute, Angel González, Clarin, Palacio Valdés, García Lorca, k=T.P.

Plenumado de taskoj.-MEL bezonas helpantoj, kiuj konstante plenumu po unu tasko. Jenaj konstantaj taskoj por la Liceo estas plenumataj.
Lupe Sanz Bueno.- Kiel prezidantino zorgas pri la bona funkciado de MEL, aktivas en LKK de la Madrida Jubilea Kongreso (serĉado de ejoj) kaj tajpas la nunan bultenon
Augusto Casquero.- Gvidas kursojn, prezidas la LKK de la Madrida Kongreso, ĉefe okupiĝas pri ties Honora KOmitato kaj subvencioj
Miguel Hernández.- Gvidas la superan kurson, tradukas Lorca por la Jubilea KOngreso.
Periko Villaroig.- Fondis kaj gvidas la ĥoron.
Gian Karlo Fighiera.- Redaktas la bultenon, gvidas la konversaciajn rondojn kaj okupiĝas pri la eksteraj rilatoj de la KOngreso
Juan Carlos Ruiz.- Eldonas la bultenon de MEL. LKK serĉado de kongresejo.
Pepe F. Arroyo.- Zorgas pri elmontrado de turismaj verkoj en FITUR (28-a ĝis 4-a februaro)
Kelkaj liceanoj plenumas aliajn taskojn en la nacia, faka kaj internacia movado.
Se iu ne havas apartan taskon, li/ŝi povus regule meminiciate, purigi la Liceon, revizii la elektran sistemon, finaranĝi la gastan ĉambron aŭ plenumi alian taskon.
Bonvolu informi la redaktoron pri eventualaj mankoj kaj eraroj en la supra listo.

Montrado de filmo. En januaro Pepe Arroyo projekciis du memfaritajn kolor-filmojn respektive pri sia vojaĝo al Pisanica (Bulgario) kaj al la Katalunaj Floraj Ludoj.

Jarfinaj aranĝoj.- Dum la dua duono de decembro, kelkaj liceanoj renkontiĝadis en kafejo kun la kursfinintoj. Festeto, en kiu partoprenis 25 geesperantistoj okazis ĉe gesignoroj Fighiera.

Kunvenis LKK.- La LKK de la Madrida KOngreso, kiu okazos dum la jubilea jaro, en 1987, kunvenis en la oficejo de HEF. Dum la kunveno estis pridiskutata la labor-plano ĝis la Vigo-Kongreso. La venonta kunsido okazos en la sama sidejo (Rodriguez SAn Pedro 13) la 20-an de februaro, je la 19-a horo, Nur interesuloj kiuj pretas vere labori estas invititoj.

## -GENERALA ASEMBLEO-

Okazos la 3-an de februaro en la sidejo de la Liceo. Atocha 98, je la 20-a

Programo:

1.- Akcepti protokolon de la antaŭa asembleo.
2.- Jar-raporton, bilancon kaj buĝeton
3.-Elekti anojn de la Estraro

VENONTA PROGRAMO VENONTA PROGRAMO VENONTA PROGRAMO VENEONTA PROGRAMO

| | | |
|---|---|---|
| Lundo 27 januaro | .......... | Konversacia Rondo |
| Lundo 3 februaro | .......... | GENERALA JARKUNVENO DE LA LICEO |
| Lundo 10 " | .......... | Angolo, mia lando, parolado de Servulo. |
| Lundo 17 " | .......... | Libera bufedo )Ĉiu membro estas petata kunporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon por komuna festo) |
| Lundo 24 " | .......... | Konversacia rondo |
| Lundo 3 marto | .......... | Konversacia rondo |
| Lundo 10 " | .......... | La filozofio de Kartesio, parolado de Rikardo Albert |

## EN HISPANIO

SAT Kongreso en Katalunio.- La 59-a KOngreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos de la 2-a ĝis la 9-a de augusto 1986 en Sant Cugat del VAllés (Barcelono). Informoj donas: Associació Cultural Esperantista, Montseny 5, Sabadell.

Libro-katalogo de HEF.- 12-paĝa listo de la libroj akireblaj en Hispanio estas mendebla ĉe HEF, Apartado 119, 47080 Valladolid

Kongresi en Vigo.- Por aliĝi al la 46-a Hispana KOngreso de Esperanto (Vigo, 15-20 julio 1986) turnu vin al LKK. Circulo Mercantil. c/ Príncipe 44. Vigo.

Hispana lernolibro.- Jam vendiĝis la mil unuaj ekzempleroj de la lerno- kaj legolibro (kun ekzercaro kaj ŝlosilo por memlernantoj) "Nuevo método de Esperanto" de De Diego. La verko estas nun larĝe utiligata ankaŭ en Latin-Ameriko.

## OKAZAS EN LA MONDO

549 Esperanto-stratoj,- Ekzistas en 33 landoj de la kvin kontinentoj 549 stratoj, monumentoj kaj aliaj aĵoj (ŝipo, aviadilo, asteroidoj, k.t.p.) kun la nomo Esperanto aŭ Zamenhof

## Eŭropaj elspezoj

En 1986, kiam la Eŭropaj komunumoj uzos 9 lingvojn, la situacio fariĝos vera Babel-turo.

Nuntempe, kun 7 labor-lingvoj ekzistas jam 42 eblaj kombinaĵoj. Ekzemple, se greko intervenas dum Konsilio de Ministroj, liaj vortoj devas esti tuj tradukitaj en la lingvojn: franca, germana, angla, nederlanda, itala, dana. Kiam ministro de iu el la aliaj membro-ŝtatoj respondas al la oratoro, necesas traduki liajn frazojn en la 6 aliajn lingvojn.

Ofte ne priskribebla estas la reganta lingva ĥaoso, asertas la partoprenantoj. Tamen, neniu pretas forlasi sian gepatran lingvon, kies defendo estas parto de la nacia prestiĝo.

Kun la adopto de la hispana kaj de la portugala lingvoj, la eblaj kombinaĵoj nombros 72 anstataŭ 42. Dejoros pli da buŝtradukistoj en la kunvenejoj. Cetere, la Komisiono antaŭvidas jam 600 kromajn postenojn, por hispanoj kaj portugaloj.

El ĉ. 15 000 eŭropaj funkciuloj, 1.700 laboras por la lingvaj servoj. Kun alveno de Hispanio kaj Portugalio, kiel novaj membro-ŝtatoj, la kunvenelspezoj altiĝos je 66%, laŭ unuaj kalkuloj.

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo Marto 1986

---

## VIVO DE LA LICEO

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, aliĝu nun al la Liceo kaj partropenu en ĝia agado konvinku simpatiantojn kaj novajn esperantistojn fariĝi membroj. Jarkotizo: 1.800 pes.

Kelkaj liceanoj ankoraŭ ne pagis la kotizon de 1985. Bv pagu per ĉekon je la nomo de Liceo Madrileño de Esperanto.

Novaj kursoj.- Antaŭ kelkaj semajnoj malfermiĝis en la Liceo nova elementa kurso gvidata de Georgo Camacho. Ĝi estis anoncita per informoj en la gazetaro kaj surstrataj afiŝoj, en kies gluado partoprenis naŭ membroj, inter kiuj angolano, japanino kaj italo.

Samtempe Augusto Casquero kaj Miguel Fernández gvidas respektive progresigan kaj perfektigan kurson

Aliaj elementaj kursoj:

Cooperativa Nueva Era. Calle del Pez 36. Miercoles de 6 ½ a 7 ½
Federación Esp. Esperanto: Rodriguez San Pedro 13. Lunes 6 ½ a 7 ½
Centro Cultural. Calle Maestro Alonso 6
Facultad de Filología. U. Autónoma de Madrid. Telefonu marde vespere: 2-30-87-

FITUR.- Sufiĉe ampleksa nombro da turismaj libroj en Esperanto estis ekspoziciata en speciala vitrino ĉe la internacia foiro FITUR-86

Liceano laboras ĉe UEA.- Nia membro Francisco Javier Monleón estas dungita kiel oficisto de UEA kaj jam de kelkaj semajnoj laboras en la Centra Oficejo, en Rotterdam. Li tre aktivis divers-maniere en Madrido, ĉefe en la literatura kampo.

Vojaĝ-karavanon al Pekina KOngreso.- Se vi deziras partopreni favor-kondiĉe en la ĉi-somera UK en Pekino, konsultu la trisemajnan vojaĝ-planon de la Liceo: Prezo: 375.000 pes.

Mallongaj diversaj informoj.- La konata hungara Esperanto-amiko, Marton Lengyel, vizitis la Liceon fine de januaro. Ankaŭ vizitis nin samideano el Argelio.

Gian Carlo Fighiera partoprenos en la 2-a Seminario pri la lingva problemo en turismo, kiu okazos en Budapeŝto de la 13-a ĝis la 18-a de marto 1986.

Bedaŭrinde Periko Vilaroig estis surstrate mon-rabita. La Liceo estis priŝtelita unu fojon plie: ĉi foje, la ŝtelistoj forportis malgrandan skribmaŝinon.

Dankon al "Gonzalez fratinoj" (Legu Emi kaj Clara) kiuj mem-iniciate purigis la tutan Liceon. Ili atingis ke la lumo trapasis pura kaj klara la fenestron.

## JUBILEA JARO

LKK serĉas kongresejon. La 20-an de februaro denove renkontiĝis la Komitato kiu okupiĝis ĉefe pri la plej grava kaj urĝa nuna problemo: la trovo de taŭga kongresejo. La venonta kunsido okazos en la LICEO JAUDON LA 20-AN DE MARTO. La afiŝoj de la Jubilea Kongreso jam estas presitaj. (Ili estas donaco de la Ministerio pri Turismo)

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

ACTA DE LA ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA DEL LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO (LME)

En la sede del LME, a las 20.00 h. del día 3 de febrero se celebró la Asamblea General Ordinaria convocada por el Presidente a través del boletín Nia Voĉo.

Se trataron los siguientes temas:

1.- Se dió lectura al acta de la Asamblea anterior. Se aprobó por unanimidad de los asistentes.

2.- Informe económico del ejercicio 1985. Se procedió a su lectura y el Presidente respondió a las preguntas que se formularon al respecto. Fué aprobado por unanimidad. El saldo a 31 de diciembre de 1985 fué de 334.861 pesetas a favor del LME. Esta cantidad está depositada en la oficina central del Banco Atlántico de Madrid. 1985 ha sido un año con un balance muy positivo ya que se han obtenido 2 subvenciones (150.000 pesetas de la Concejalía de Cultura del Ayuntamiento y 75.000 de la Consejería de Cultura de la Comunidad Autónoma de Madrid)

3.- Presupuesto para 1986. Se presentó un presupuesto de 382.000 pts comentando el Presidente que se ha confeccionado muy ajustado y que si se desean hacer gastos extraordinarios hay que pedir subvenciones a los organismos oficiales. Se comentó que durante los dos años próximos sería dificil obtener subvenciones ya que se estaban pidiendo para la celebración del Congreso Jubilar de 1987 y en los centros oficiales no distinguían bien entre LME organizador del Congreso y LME asociación socio-cultural por lo que no se podían pedir dos subvenciones al mismo sitio.

4.- Renovación de la Junta Directiva. Todos los miembros presentes manifestaron su deseo de dimitir. Se aceptaron únicamente los cargos que fueron cubiertos por las siguientes personas:

Vocal juvenil: Jorge Camacho
Vocal biblioteca: Jesús Sánchez García
Vocal enseñanza: Pedro García Escribano
Tesorero: José Francisco Platas.

El resto de la Junta Directiva quedó tal como estaba:

Presidente: Guadalupe Sanz Bueno
Vicepresidente: Miguel Fernández Martín
Secretario: Emilia González
Vicesecretario: Juan Carlos Ruiz
Contador: José Mª González Aboín
Bibliotecario: José Fernández-Arroyo
Relaciones públicas: Georgette Lelievre
Vocal secretaría: A. Casquero de la Cruz

5.- Ruegos y preguntas. A. Casquero apuntó la conveniencia de celebrar las actividades del Liceo a lo largo de toda la semana y no únicamente los lunes, con el objeto de que todos los días haya alguien en la sede para informar a los interesados. Se acordó establecer "turnos de guardia" y que cada uno venga por lo menos otro día al mes, aparte de los cuatro lunes.

Tambien A. Casquero propuso hacer una reparación en el local social de cara al Congreso Jubilar y las posibles visitas que se recibiran. Se aprobó por unanimidad emplear 40.000 pesetas en este menester, aparte del arreglo de las goteras que deberá ser pagado por el vecino del piso superior. J.Francisco Platas quedó encargado de coordinar todo lo relativo a mantenimiento.

Sin más asuntos que tratar se cerró la sesión a las 21.30 h.

SI TIENES COMENTARIOS A ESTE ACTA ENVIALOS AL LICEO ANTES DEL 24 DE MARZO

---

VENONTA PROGRAMO VENONTA PRGRAMO VENONTA PROGRAMO

Lundo 3 marto................ Konversacia rondo
Lundo 10 marto ............... "La filozofio de kartesio"Parolado de Rikardo Albert
Lundo 17 marto ............... Libera bufedo. Ne forgesu kunporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon
Ĵaŭdo 20 mardo ............... Kunveno de L.K.K. (Jubilea Kongreso)

Organo de Madrida Esperanto Liceo.
Majo 1986

## VIVO DE LA LICEO

Ĉu vi deziras ricevadi tiun-ĉi bultenon?.- Se jes, ne forgesu pagi vian kotizon al la LICEO: 150 pes monate aŭ, se vi preferas, 1.800 pes jare .Plej simple por vi kaj por la LICEO estas ke vi hejmigu la pagon ĉe via Banko (Domiciliar la cuota en el banco) La LICEO povas vivi nur se ĉiuj plenumas sian devon regule pagi sian kotizon

Komuna celebro de la morto-tago de ZAMENHOF.-La 14-an de aprilo kelkaj (sed ne multaj) liceanoj renkontiĝis en la Madrida sidejo de HEF en Rodriguez San Pedro por auskulti la prelegon de Angel Figueroa pri "La historio de la klopodoj por internacia lingvo"

Vizito.- En aprilo la Liceon vizitis pola blindulo vivanta jam de kelkaj jaroj en la Kanariaj Insuloj kaj kreinto de la premio Grabowski.

Kion vi povas fari por Esperanton?.-La respondo al la demando estas ke vi agadu regule por la disvastigo de la lingvo kaj ke vi helpadu la Movadon (MEL, HEF, UEA, la fakajn asociojn). Aktivu nur laŭ viaj eblecoj, transprenu eble nur unu taskon sed plenumu ĝin memstare kaj ĝisfunde, forlasi komencitan laboron estas pli malbone ol tute ne komenci ĝin.

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | | |
|---|---|---|
| Lundo | 5 majo | Konversacia rondo |
| " | 12 majo | "Nia amiko la kometo Halley" parolado Sro. Aboín. |
| " | 19 majo | Libera bufedo, ĉiuj esta petataj alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon. |
| GRAVA → Jaŭdo | 22 majo | KUNVENO DE LKK EN LA SIDEJO DE LA LICEO. (Nur por seriozaj interesitoj) |
| Lundo | 26 majo | Konversacia rondo |
| " | 9 junio | "Enkondukon en la ĉinan lingvon" prelego de Ana Montesinos |
| " | 14 julio | "Iom pri la ŝakludado", parolado de Jesús Sánchez García |

LA KUNVENON OKAZOS EN Atocha 98 JE LA 20-a HORO

Saluton, Clara kaj Emi.- La konataj aktivulinoj Clara kaj Emilia González momente laboras respektive en Francio kaj Svisio. Fakte, ili loĝas ĉe amblaŭ flankoj de la landlimo inter ambaŭ landoj kaj povas renkontiĝi tre facile. Ili skribe salutas ĉiujn geamikojn. Ni deziras al ili sukceson kaj feliĉon.

## JUBILEA JARO

La L.K.K. dum unu jaro serĉadis taŭgan sidejon por la jubilea kongreso kiu okazos en Madrido dum Pasko 1987. ĉiuj esploritaj kunvenejoj montriĝis aŭ nesufiĉe grandaj aŭ tro multekostaj (pli ol 100.000 pes. tage). Fine, dank'al Periko Vilaroig, LKK akiris por la KOngreso la MINEJAN LERNEJON, kie la kongresanoj ankaŭ povos malmultekoste tagmanĝi.
L.K.K. plue klopodas atingi subvenciojn kaj jam komencis inviti eminentulој aliĝi al la Honora Komitato (Lupe Sanz kaj Augusto Casquero). Pri la loĝado akupiĝas Pepe Arroyo. Esplorata estas la ebleco organizi ekspozicion. G.C. Fighiera okupiĝas pri la eldonado de informilo disdonota en Vigo: li krome, respondecos pri publika informado (gazetaro) kaj pri la KOngresa Libro.

Aliflanke estas ĝojige anonci ke la fama verkisto kaj Esperanto-poeto William Auld, antaŭa Prezidanto de la Akademio, akceptis fest-paroladi dum la KOngreso pri "Cent jaroj de lingvo kaj espero"

## OKAZAS EN HISPANIO

<u>Ferii en Malago</u>.- La 4-an kaj 5-an de aŭgusto okazos en Malago la Unua Renkontiĝo de Fŝriantaj Esprantistoj (Andaluza Esperanto-Unuiĝo. Trinidad Grund 28-2º.29001 Malago)

<u>Afiŝo pri Andaluzio</u>.- Kontraŭ pago de 80 pes. oni povas ricevi la luksan Kongres-libron kaj la belan afiŝon eldonitajn okaze de la 3-a Andaluzia Esperanto KOngreso (S.E.J.O, Pozo 3, 41003 Sevilla)

<u>Intensa Kurso en Valencio</u>.- Trideko da personoj ĉeestis la inaŭguron de la unua intensa kurso, kiun aranĝis Dennis Keefe. La celo estas lernigi en unu tago al nesciantaj tiom da Esperanto kiom eble.

<u>Frank Buckley al Hispanio</u>.- La angla esperantisto Frank Buckley (620 Filton Ave. Bristol, Britio) kutimas prezenti dum siaj vojaĝoj son-lumbildan programon "50 jaroj de Esperanto". Li eble vizitos Hispanion ĉi-Somere.

<u>Kiel kontribui al la Esperanta Literaturo</u>¿.- La Literatura Fako de la Hispana Jubilea Komisiono (Carreras Candí 36, Barcelono-28) planas eldoni plarajn alt-valorajn literaturaĵojn en Esperanto. Por subteni la klopodoj estas konsilinde aboni la unuojn kvar volumojn kontraŭ pago da 2.200 pes.

Para poner en marcha la "Literatura Fako", edición de obras de literatura española traducidas al Esperanto, necesitamos 100 esperantistas que esten dispuestos a adelantar 2.200 pta., precio de cuatro volumenes de la colección "Hispana Literaturo". El pago se hará por giro postal a la cuenta nº 964420 de la Caja Postal, a nombre de Miguel Gutierrez Adúriz, y enviando una nota de pedido al mismo nombre y a la siguiente dirección: Floranes 57-2ºC, 39010 Santander.

Los 100 primeros abonados aparecerán inscritos en un cuadro de honor del Boletín de HEF.

El primer volúmen de la colección ha sido "La familio de Pascual Duarte" de C.J. Cela y <u>no entrará</u> en el lote de 4

La traducción de García Lorca "Bodas de Sangre" y "La casa de Bernarda Alba" tampoco entrará en este lote ya que <u>se regalará un ejemplar</u> de esta obra a los <u>100 primeros inscritos al CONGRESO JUBILAR DE MADRID</u>.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

Liceo

KONGRESO ESPERANTO
MADRIDO 1987
aprilo

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO
Organo de Madrila Esperanto-Liceo
Junio 1986 150 ekzempleroj

## VIVO DE LA LICEO

Kion koni konekse kun kometoj?.- La aliteracia titolo referencas al la prelego de González-Aboín ĝenerale pri kometoj kaj aparte pri Halley. Gi okazis en majo kaj stimulis instru-plenan diskuton.

Vizito de ĉina esperantisto.- En majo, la Madrida Liceo ricevis kelkajn vizitojn. Temis pri esperantisto el Kartageno, pri germana turisto kaj pri la reprezentanto de "El Popo la Cinio", kiu jam duafoje ĉeestas kunvenon de MEL: Li restados en Madrido ĝis februaro.

Aŭtunaj programoj.- Aŭguste ne okazos formalaj programoj, sed la sidejo restos normale malfermita. En septembro estos pritraktitaj la someraj kongresoj. En oktobro/novembro estas anoncitaj paroladoj respektive de Aŭgusto Casquero pri malsanoj de la parol-kapablo kaj de Pepe Arroyo pri siaj originalaj poemoj.

* * La LICEO urĝe serĉas preleganton por la decembra Zamenhof-festo.

Peto pri rekono de publika utileco.- Sub la kunordigado de Juan Carlos Ruiz, kelkaj divers-urbaj esperantistoj kun-verkis dokumenton pri la sociaj, humanecaj, kulturaj kaj praktikaj valoroj de Esperanto. La documento, al kiu kunlaboris Rafaela Urueña, Marco Botella, J.C. Ruiz, Gian Carlo Fighiera, Juan Régulo kaj aliaj, estos utiligata i.a. por peti, ke HEF estu agnoskita kiel asocio de publika utileco.

Prelego.- Juan Navareño prelegis pri Esperanto en "Hogar Extremeño".

Monato nº 3/86.- Artikoleto kun desegnoj de Georgo Kamaĉo

### VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

Lundo 9 junio ............."Iom pri la ĉina lingvo" parolado de Ana Montesinos.

Lundo 16 junio ............ Libera bufedo ĉiuj bonvolu kunporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon

Lundo 23 junio ............ Konversacia rondo

Lundo 30 junio ............ Konversacia rondo

Lundo 14 julio ............ Enkonduko en la ŝakludadon. Parolado de Jesús Sánchez.

La kunvenoj komenciĝas je la 20,30 horo en la sidejo de Atocha 98

Krome dum la ŝemajno necesas la deĵorado de voluntuloj por diversaj taskoj en la LICEO.

KONGRESO ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

**JUBILEA KONGRESO**

Pretas en Esperanto verko de Lorca.- Miguel Fernández fintradukis en Esperanto la teatraĵon "La domo de Bernarda Alba". La verko estas nun reviziata. La tradukinto preparas nun la tradukon de alia Lorcaĵo: "Sanga edziĝo-festo". Ĝi estos finpreta en septembro kaj aperos ĝis la nacia kongreso en Madrido.

Formiĝis provizora kongres-komitato.- La Loka Kongresa Komitato (LKK) de Madrida Jubilea Kongreso (Pasko 1987) provizore konsistas el:

- .- Augusto Casquero.............. Prezidanto- Oficialaj rilatoj
- .- Gian Carlo Fighiera.......... Vic-prezidanto- Publika informado
- .- Belén Simón .................. Kasistino
- .- Lupe Sanz Bueno .............. Eldonaĵoj
- .- Juan Carlos Ruiz ............. Loĝado- Kongresejo
- .- Pedro Villaroig .............. KOngresejo
- .- Miguel Fernández ............. Kulturaj kaj artaj programoj
- .- Pedro García kaj Jesús Sánchez. Ekspozicioj
- .- Jorge Camacho/ Ricardo Albert..Vizitoj kaj ekskursoj

La Bulgara Esperanto Teatro ludos Arrabal.- La Bulgara Esperanto Teatro, trupo de profesiaj aktoroj, kiu jam ludis en Universalaj KOngresoj, akceptis la inviton de LKK sur scenigi verkon en Esperanto dum la Madrida Kongreso. La interkonsentita teatraĵo estos "Pikniko sur la fronto" de Fernando Arrabal.

Aranĝita la loĝiga servo.- Dank'al la laboro de Juan Carlos Ruiz, estis kunmetita listo da selektitaj divers-kategoriaj hoteloj kaj pensionoj. La listo aperos en la unua informilo nun redaktata kaj disdonota en la Viga Kongreso.

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98 . MADRID - 28012

KONGRESO ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

Organo de MADRIDA ESPERANTO LICEO Septembro 1986

## VIVO DE LA LICEO

Nova Esperanto-vivo en Madrido.- Post la somera paŭzo, la agado por la internacia lingvo renaskiĝas en Madrido kun nova fervoro

Kelkaj eraretoj.- Bonvolu noti jenan korektan ortografion de personaj nomoj: Pedro Garrote (ne García) kaj MIguel Fernández (ne Hernández) en la 1-a informilo de la 47-a Kongreso

Gratuloj al niaj studentoj.- Ĉiuj liceaj studentoj sukcesis en siaj ekzamenoj, temas pri Miguel Angel Sancho kiu finis siajn studojn kaj baldaŭ soldat-servos, Georgo Camacho kiu nun provizore deĵoras ĉe UEA, en Roterdamo kaj RiKardo Albert.

Kondolencoj al Jesús.- La membraro de MEL profunde kondolencas al Jesús Sánchez pro la forpaso de lia patro.

La ĥoro progresas.- La kvar-voĉa ĥoro de la Liceo, fondita de Periko Villaroig, tre sukcese kantis en la sidejo, antaŭ la someraj ferioj.

Emi revenis.- Emi González revenis al Madrido post kelkmonata restado en Svisio. La fratino Clara momente restas en Francio.

Tre bonvena subvencio.- La ĝojiga informo, ke la Ministerio pri Kulturaj Aferoj asignis al la Liceo subvencion de 135.000 pesetoj, alvenis.

Kiu prelegos en decembro?.- Daŭre serĉata estas preleganto por la Zamenhof-festo, kiu okazos en decembro.

Ana Montesinos tra Eŭropo.- Dum la pasintaj monatoj Ana Montesinos partoprenis en Esperanto-aranĝoj en La Chaux-de-Fonds (Svisio) kaj vizitis la sidejon de UEA en Roterdamo.

Francisco Javier gajnis premiojn.- Francisco Javier Monleón, kiu nun deĵoras kiel oficisto de UEA, gajnis du premiojn en la ĉijara Belarta KOnkurso, kies rezultoj estis proklamitaj dum la fermo de la UK en Pekino,

Revenis Márton Lengyel.- La hungara samideano Márton Lengyel, kiu sukcesigis la Manilan resolucion pri ESperanto, denove oficas en Madrido, kie li restados supozeble kelkajn jarojn.

Paca poemo.- UEA selektis verkon de Pepe Arroyo, originale en Esperanto. La poemo aperis en la "Poemaro de la paco" disdonita al la aliĝintoj de UK en Pekino.

Georgo Camacho denove kunlaboris en Monato.- En la numero 4/86 aperis verko de Georgo

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | | |
|---|---|---|
| Lundo 1 septembro | ....... | Konversacia rondo |
| Lundo 15 septembro | ....... | Raportoj pri la kongresoj en Vigo kaj Pekino |
| Lundo 22 septembro | ....... | Konversacia rondo |
| Lundo 29 septembro | ....... | Konversacia rondo |
| Lundo 6 oktobro | ....... | "Malsanoj de la parolkapablo" parolado de Augusto Casquero. |
| Lundo 3 novembro | ....... | "Verda fumo" originalaj poemoj de Pepe Arroyo |

La kunvenoj komenciĝas je la 20.00 horo en la sidejo de Atocha 98-4ªa

Krome, ĉiutage dum la semajno necesas la deĵorado de voluntuloj por diversaj taskoj en la Liceo

ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

JUBILEA KONGRESO

Unua informilo.- Vi povas ricevi en la sidejo la unuan informilon de la Jubilea Hispana Kongreso kiu okazos en Madrido de la 16-a ĝis la 20-a de aprilo 1987. La informilo, verkita de diversaj personoj kaj tajpita de Periko Villaroig, enhavas bonvenigan mesaĝon de la Urbestro de Madrido, loĝigajn informojn kaj provizoran kongres-programon.

Kongresa propagando.- Dum la Hispana Kongreso en Vigo okazis intensa propagando por la Jubilea KOngreso en Madrido. Inter alie estis ekspoziciitaj la enkadrigitaj mesaĝoj de la Reĝo kaj de la Urbestro de Madrido, estis disdonitaj la unua informilo kaj la aliĝiloj, estis kolektitaj aliĝoj kaj estis organizita publika inform-kunveno.

Donaco el Cheste.- La esperantistoj de Cheste promesis donacon de granda kvanto da vinboletoj dank'al kiu, verŝajne, LKK povos regali la tutan kongresanaron per giganta sangrio.

Nova Honora Komitatano.- La Direktoro de la Hispana Lingvo-Akademio, S-ro Lain Entralgo, akceptis eniri en la KOngresan Honoran KOmitaton

Helpu vi ĉiuj.- La membroj de MEL estas alvokataj helpi en la sukcesigo de la Jubilea Kongreso:.- antaŭvidu esti libera jam kelkaj tagojn antaŭ la KOngreso.- Aliĝu tuj al la KOngreso.- gastigu ĉe vi, se vi povas, eksterlandajn kongresanojn, ĉefe la aktorojn de la Bulgara Esperanto Teatro.- helpu Platas farbi, tapeti kaj renovigi la Liceon.- Kunlaboru en la organizo de novaj elementaj kaj progresigaj kursoj por bone prepari novajn kongresanoj.

OKAZAS EN HISPANIO

Tom pli ol 200 esperantistoj aliĝis al la Hispana Kongreso en Vigo (Julio). La Urbestro de Vigo promesis doni la nomon Esperanto al loka strato.

En Los Alcarares (Murcio) estis inaŭgurita Strato Esperanto

Kanaria Televido elsendis preskaŭ duon-horo programo pri Esperanto. Parolis Régulo Pérez kaj A. Góralski.

OKAZAS EN LA MONDO

La 71-an UK de Esperanto en Pekino partroprenis pli ol 2.400 kongresanoj, el kiuj 300 ĉinoj. Sufiĉe multaj hispanoj, inter kiuj deko da madridanoj, ĉeestis la eventon kaj kuraĝe rompis la grandan muregon.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98 . MADRID - 28012

KONGRESO
ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

## VIVO DE LA LICEO

"Nia Voĉo" estas senpaga!.- Tiu ĉi bulteno estas senpaga por la membroj de la Liceo. Por ricevi ĝin, vi nur devas regule pagi vian kotizon: per tio vi plenumas vian moralan de-von kiel esperantisto kaj helpas la Madridan Liceon daŭrigi sian laboron favore al la in-ternacia lingvo.

Novaj kursoj ekde oktobro.- Mardon, la 7-an de oktobro, je la 20-a h. malfermiĝos en la sidejo elementa kurso gvidata de Augusto Casquero. Tiuj, kiuj deziros lingve prepari sin por la Hispana Kongreso,kiu okazos dumpaske en Madrido, kun ĝojo ekscios ke Miguel Fernàn-dez gvidos daŭrigan kurson ĉiulunde je la 19-a horo ekde la 13-a de oktobro. Diversaj tea-moj de Madridaj esperantistoj gluis surstrate informajn afiŝojn pri la kursoj.
Ekde oktobro ankaŭ Juan Navareño gvidos elementan kurson en Club Amigos de UNESCO. Tirso de Molina. Je la 20.00 h. merkrede

Servulo vivas en Parizo.- Servulo, kiu dum pli ol unu jaro vivis en Madrido, sukcesis fan-siri al Parizo, kiel rifuĝinto. Pro sia kono de la franca lingvo, li esperas havi tie pli da ŝancoj kaj eble, ricevi stipendion.

Bonvenon Roy!.- La usona studento Roy Mc Coy el Cambridge (Massachusset) alvenis Madri-don por lerni hispanistikon. Li vizitadas la Liceajn Kunvenojn.

Esperanto kaj Paco.- D-rino Rafaela Urueña, docentino pri juro en la Universitato de Va-lladolid, akceptis fest-prelegi, okaze de la decembra Zamenhof-memor-kunveno, en Madrido. La elektita temo estos: Esperanto kaj Paco.

Okazis en Pekino:- En septembro la partoprenintoj en la U.K. en Pekino rakontis siajn tra-vivaĵojn dum tiu neforgesebla evento.

Invito al TEJO.- La Liceo invitis la Estraron de TEJO kunside en Madrido dum la tagoj de la Hispana Esperanto Kongreso.

Kristnaska Loterio.- En la Liceo estas aĉeteblaj la biletoj de la Kristnaska Loterio. La numero de la bonŝanco estas 24.122

Radio-intervjuo.- Radio Cadena Granada disaŭdigis la 16-an de Augusto 30-minutan intervjuon al kelkaj anoj de la 4-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, inter kiuj membro de la Liceo. La parolisto montriĝis favora al nia lingvo kaj provizis utilajn informojn kaj adresojn.

Je la 20.00 horo en Atocha 98-4º

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | | |
|---|---|---|
| Lundo 6 oktobro | ......... | "Verda fumo" Originalaj poemoj de Pepe Arroyo |
| " 13 " | ......... | Konversacia rondo |
| " 20 " | ......... | Libera bufedo=ĉiuj bonvolu alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon. |
| Vendredo 24 " | ......... | Fotografaĵoj, lumbildoj kaj filmoj pri la U.K. en Pekino. Je la 19.30 h. en la Liceo |
| Lundo 27 " | ......... | Lumbildoj pri la UK en Pekino |
| " 3 novembro | ...... | "Enkonduko en la ŝakludadon".Parolado de Jesús Sánchez |
| Sabato 13 decembro | ...... | Zamenhof-festo kaj komuna vespermanĝo |

Aldone al la supraj programoj necesas insisti ke la Liceo bezonas ĉiutage deĵorantojn en la sidejo por diversaj taskoj.

KONGRESO HISPANA ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

## JUBILEA KONGRESO

Aliĝado.- Cento da hispanaj kaj eksterlandaj esperantistoj ĝis nun aliĝis al la Madrida KOngreso

Honora KOmitato.- Kelkaj eminentuloj jam respondis al la invit-leteroj senditaj de L.K.K. koncerne aliĝon al la Honora Komitato. Inter la respondintoj troviĝas: Marcelino Oreja, Generala Sekretario de la Europa Konsilantaro, Joaquin Leguina, Prezidanto de la Madrida KOmunumo, Juan Barranco, Urbestro de Madrido. Krome, Pedro Laín Entralgo Direktoro de la Reĝa Hispana Akademio, kaj Enrique de la Mata Gorostizábal, Prezidanto de la Internacia Ruĝa Kruco, akeptis eniri en la Internacian Patronan Komitaton por la Jubilea Jaro, fondata de UEA.

Ĉef-verko eldonotaj.- Dank'al interveno de Juan Carlos Ruiz, la Hispana UNESKO-Komisiono eldonos Hispanan Antologion en Esperanto, en traduko de Fernando de Diego. Intertempe Miguel Fernández finis la tradukon de dua verko de F.García Lorca, nome: "Sanga nupto" Ĝi nun estas reviziata antaŭ la fina eldono.

Broŝuro pri HISPANIO en Esperanto.- La traduko fare de D-rino Urueña de broŝuro pri Hispanio estas fin-kompostita: la lasta presprovaĵojn korektis Ada Fighiera. La eldono aperos kiel eble plej baldaŭ.

La bulgaraj geaktoroj gastigotaj.- Ana Montesinos anoncis sian pretecon gastigi ĉe si kelkaj el la geaktoroj de la Bulgara Esperanto-Teatro. Se iu alia liceano povas gastigi eksterlandanojn dum la kongreso, li/ŝi bonvolu anonci sin.

Kongresa libro.- La Kongresan libron redaktas Gian Karlo Fighiera. Sugestoj estas bonvenaj.

Pastro serĉata.- Oni serĉas pastron, kiu celebru dum la kongreso la Meson en Esperanto.

Speciala poŝtmarko.- La ŝtata Komisiono por eldono de dat-revenaj poŝtmarkoj malakceptis la proponon eldoni poŝtmarkon pri la Jubilea Jaro, ĉar la programo jam estas kpm—pleta.

NECESITAMOS TU AYUDA PARA LA ORGANIZACION DEL KONGRESO. !!ACUDE AL LICEO!!

!! ESPERAMOS TU INSCRIPCION !!

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

KONGRESO HISPANA ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

VIVO DE LA LICEO

Zamenhof-memorcelebro.- D-rino Rafaela Urueña, docentino pri juro en la Universitato de Valladolid kaj presidintino de HEF, akceptis prelegi en Madrido, dum la Zamenhofa festo, kiun la Liceo celebros la 13-a de decembro ĉe Casa de Guadalajara en Madrid. Plaza de Santa Ana 15. La bankedo kostos 700 pes. bv aliĝu en la Liceo (Platas)

Gluado de afiŝoj.- Deko da aktivaj liceanoj en septembro gluis divers-loke en Madrido kelk-centojn da afiŝoj anoncantajn la novan kurson. La laboro okazis vespere, tre rapi de kaj en tre bonhumora etoso. La operacio estas ripetenda venontjare, ĉar la rezultoj estas tre kontentigaj.

Aparte de tio, informaoj pri la kurso aperis en pluraj gazetoj, inkluzive de la tre konataj "Villa de Madrid" kaj "Guía del ocio".

Tre sukcesis la novan kurso.- Resulte de la vasta propagando farita, kvindeko da lerne muloj aliĝis al la nova kurso. Sekve de tio, necesis spliti ĝin en du branĉojn. La unan -marde kaj jaŭde-gvidas Augusto Casquero, la duan-merkrede kaj lunde- Ana Montesinos.

Lernolibroj.- Kvankam la instruistoj aplikos sian personan instru-metodon, multaj ler nantoj (ĉefe la plej diligentaj) deziras ankaŭ sekvi bonan lernolibron, kiu propunu abundajn ekzercojn kaj bazajn informojn pri la praktika utiligado de Esperanto, pri ĝi aj literaturo kaj movada organizo. Necesas, tial, helpi ilin en la akiro de la bezona-ta lernilo.

Iniciativo de la "Colegio de Licenciados".- Pere de belaspekta speciala flugfolio, la "Colegio de Licenciados de Madrido" anoncis al siaj 13.000 membroj la malfermon de teori-praktika kurso de Esperanto, kiun gvidos Augusto Casquero. La dirita kurso okazos mar-de kaj jaŭde je la 18,30 horo inter la 11-a de novembro kaj la 18-a de decembro 1986. Minimume nombro da gelernantoj: 15.

Propagandilo de la Liceo.- La Madrida Esperanto-Liceo eldonis ses-paĝan fald-folion, kiu prezentas la fundamentajn valorojn de la internacia lingvo. Ĝi estas senpage je dis pono de la membroj. Estas oportune, ke ĉiu inform-petanto, kiu vizitas la Liceon ricevu ekzempleron de la fold-folio.

Planoj por la Biblioteko.- Siatempe, la Estraro de la Liceo decidis aĉeti ĉiumonate Esperanto-verkon por la Biblioteko. Pedro Garrote jam mendis kvanton da libroj ĉe HEF.

Fariĝu membro de la Liceo!.- Se vi deziras kontribui al la strebado por la disvastigo de la internacia lingvo, fariĝu membro de la Madrida Esperanto-Liceo. La kotizo estas 150 pes. monate. Vi povas ankaŭ pagi ĝin en unu fojo (1.800 pes. jare), plej simple pere de la Banka-ĝiro. Hejmigu la pagon ĉe via Banko!.

La lupago de la sidejo, la telefono kaj la propagando favore al Esperanto postulas grandajn kostojn, kiujn la Liceo povas alfronti nur se ĉiuj regule pagas sian kotizon.

Si en la etiqueta con tu dirección figura una "D", encima de tu número de socio, es que debes tu cuota al Liceo. Págala lo antes posible.

Ĉu vi riĉiĝos per la Kristnaska Loterio?.- La liceanoj havos ŝancon gajni premion ĉe la Kristnaska Loterio aĉetante la biletojn de la Liceo: numero 24.122

Alvoko estas direktita al ĉiuj membroj por ke ili kunhelpu en la amasa ven dado de la supre menciita biletoj.

Juan Carlos en Kubo.- Kubo ĵus havis la honoron ricevi la deĵor-viziton de Juan Car-los Ruiz, kiu restadis en la lando dum ĉ. du semajnoj.

Necesas renovigi la Liceon.- Dum la somero, Platas farbis la koridoron, pro kio li estu dankata. Necesas, tamen farbi ankaŭ la aliajn ejojn kaj renovigi la tutan sidejon, antaŭ vide al la Madrida Kongreso. La estraro de MEL, tial alvokas ĉiujn helpemajn membrojn-ĉefe tiujn, kiuj ne havas aliajn taskojn (kursgvidado, deĵorado, tradukado, k.t.p. kaj disponas pri iom da libera tempo, ke ili kontaktu Platas kaj helpu lin fini la komencitan laboron. Ankaŭ la Liceo bezonas ĉiutage deĵoron de voluntuloj por diversaj taskoj

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

Lundo, 3 novembro ......... Konversacia rondo.
Lundo 10 novembro ......... "Pirandello aŭ la vivo estas teatraĵo". Prelego de Gian Carlo Fighiera.
Lundo, 17 novembro ......... Libera bufedo. Ne forgesu alporti manĝaĵon/trinkaĵon
Lundo, 24 novembro ......... Konversacia rondo.
Lundo, 1 decembro ......... "La veturado de Pioneer 10 al Mardo". Fernando Marcos
Sabato, 13 decembro ......... ZAMENHOF-FESTO
La kunvenoj komenciĝas je la 20.00 horo en Atocha 98-4º

KONGRESO ESPERANTO 47a HISPANA 1887 1987 MADRIDO 1987 16-20a aprilo

JUBILEA KONGRESO

Honora Komitato.- Lastatempe aliĝis al la Kongreso jenaj eminentuloj: Felipe González, ĉef-ministro. Felix Pons, Prezidanto de la Parlamento, C.J. Cela, membro de la Lingva Akademio kaj mondfama verkisto, utilas rememori ke la patro de Cela estis esperantisto.

Bulgara Esperanto Teatro.- La B.E.T. konfirmis sian akcepton ludi dum la Madrida KOngreso. La ses geaktoroj estos komplete gastoj de la KOngreso. Ana Montesinos tre afable proponis ke ili tranokti ĉe ŝi.

Broŝuro pri Madrido.- Dank'al la insistaj klopodoj de Augusto, ekzistas espero, ke aperos du turismaj broŝuroj en Esperanto pri Madrido

OKAZAS EN HISPANIO

Savi la dunoj de Marbella.- La Regiona Registraro de Andaluzio eldonis ekologian foldfolion en kvar lingvoj, inter kiuj Esperanto.

OKAZAS EN LA MONDO

Jubilea KOngreso en Varsovio.- Se oni aliĝas grupe al la UK (Minimume 25 personoj), oni ricevas gravan rabaton. Interesuloj povas sendi la supran rabatitan kotizon, 8.650 pes ĝis la 31-a de decembro al Azcuénaga (Gral Dávila 127. Portal 7-2º Iz. 39007 Santander) per ĉeko indikante la kodo numeron de UEA, se oni konas ĝin. La madridanoj povas pagi kontante en la sidejo de la Liceo la 24-an de novembro.

Siaflanke, HEF preparas aviadilan karavanon al Varsovio. Informojn petu ĉe HEF

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012

KONGRESO ESPERANTO 47a HISPANA 1887 1987 MADRIDO 1987

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Decembro 1986

## VIVO DE LA LICEO

Pardonu la erarojn.- La provizora redaktoro petas pardonon pro la tajp-eraroj, kiuj enŝoviĝis en la lastan numeron kaj kiuj aspektas kiel lingvaj eraroj. Espereble, la nuna estos la lasta pardon-peto de la ĝis nun longa serio.

La belaĵoj de Kubo.- Juan Carlos Ruiz tre toresk-stile pentris en la Liceo la bildon pri Kubo, ĝiaj belaĵoj, belulinoj, sukcesoj kaj fiaskoj.

Henriko la IV-a survoje al Canossa.- La realo kaj ŝajno, la alternado kaj enmiksiĝo de viva vero kaj teatra ludo en la homa ekzistado, laŭ la koncepto de Pirandello, estis la temo kaj posta diskut-objekto de parolado de Gian Carlo Fighiera, okaze de la surseenigo en Madrido de "Henriko la IV-a" de la dirita aŭtoro.

ZAMENHOF MEMOR-CELEBRO
En Casa de Guadalajara, Plaza de Santa Ana 15-1º
Sabaton, la 13-an de decembro 1986 je la 19.00 horo
.- Kantos la ĥoro de la Madrida Esperanto Liceo
.- Prelegos D-rino Rafaela Urueña, docentino pri juro en la Universitato de Valladolid.
.- Okazos disdono de diplomoj al la novaj gelernatoj
.- Sekvos komuna vespermanĝo en la sama sidejo: la banke do kostos 700 pesetojn antaŭpagendajn al Pepe Platas.

Alvenis la Kristnaska Loterio.- ĝi malavare disdonos riĉon al multaj personoj. Kial ne ankaŭ al esperantistoj?. Aĉetu la biletojn de la Liceo kaj vendu ilin inter viaj konatoj. La gajnonta numero estas: 24.122.

Financa situacio de la Liceo.- Per siaj enspezoj, la Liceo apenaŭ povas kovri siajn kurantajn vivo kostojn. Ne forgesu subteni ĝin per via aliĝado kaj regula pagado de via kotizo.

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundo, 1 decembro............ | "La veturado de Pioneer 10 al Marso". Parolado de Fernando Marcos |
| Dimanĉo 7 " ............. | FIESTA DE LAS MIGAS. Jadraque (Guadalajara) La LIceo konkursos. 11.00 horo matene. |
| Merkredo, 10 " ............. | La ĥoro VERDA STELO prezentos siajn kantojn en Jura Fakultato. 19,00 horo. |
| Sabato, 13 " ............. | Celebrado de la Zamenhofa festo en la Casa de Guadalajara. 19,00 horo. |
| Lundo, 15 " ............. | Libera bufedo. Ĉiu membro estas petata alporti manĝaĵon aŭ/kaj trinkaĵon. |
| Lundo, 22 " ............. | Konversacia rondo |
| Lundo 29 decembro ............ | Konversacia rondo |
| Lundo, 5 januaro............. | Konversacia rondo |

La kunvenoj komenciĝas je la 20-a horo en Atocha 98-4-a etaĝo.
Dum la tuta semajno estas bezonataj voluntuloj por diversaj taskoj en la Liceo

Bal... ...iĝos la provizora redaktado.- La nuna provizora redaktoro informas, ke li da... rig... sian funkcion ĝis la fino de la venonta jaro 1987. Ekde tiu dato necesos ke alia definitiva redaktoro transprenu la taskon.

JUBILEA KONG...

Novaj Honor-komitatanoj.- Lastatempe aliĝis al la Kongresa Honora Komi... ...enaj personoj: José Mª Tomás Puch, Direktoro de la Oficiala Lingvo-le...jo; Francisco Mich vila Pitarch, Direktoro de la Madrida Min-lernejo; ...yetano López Martínez, Rektoro de la Autonoma Universitato; Amador Sch... Rektoro de la Universitato Komplutense; Enrique del Moral, eks-konsila... pri Kulturo de la urbo Madrido; Manual Fraga Iribarne, ĉefo de la Opo...; Javier Solana Madariaga, Ministro pri Kulturo.

Subvencio por la ekspozicio.- La Kultura Ministerio asignis al la KOngreso subvencion ... 100 mil pesetoj por organizo de Esperanto-ekspozicio dum la Jubilea Jaro. Ekde la 9-a ... la 14-a de decembro okazos libro-ekspozicio en la Jura Facultato.

OKAZAS EN HISPANIO

Olimpikaj ludoj 1992.- Adam Góralski, venezuela blindulo, poldevena, loĝanta en la Kana... Insuloj, sendis leteron al la plej gravaj politikistoj, al la gazetaro kaj TV (P.Miró) ...tante apogi kampanjon por la utiligo de la internacia lingvo en la olimpikaj ludoj 199...

Girona.- Dum la urba Libro-tago funkciis surstrata budo kun Esperantaj libroj; grandaj desegnaĵoj estis pentritaj sur strat-muroj en Girona, Caldes de Malevella kaj Banyoles.

Sabadell en Esperanto.- Aperis plurkolora turisma faldfolio en diversaj lingvoj, inter ...kiuj Esperanto.

Kursoj en la UNESKO-Klubo.- Du elementaj kursoj estas anoncitaj en Barcelono: unu por ...junuloj kaj alia por plenkreskuloj. Krome estas antaŭvidita progresiga kurso kaj ĉiuse...na praktikado.

Al ĉiuj siaj membroj kaj simpatiantoj la Liceo deziras agrablajn jar-finajn festo-tagojn.

EL LICEO ORGANIZARA UNA CARAVANA EN AVION A VARSOVIA CON FECHA DE SALIDA el 24 ... el 25 de julio. Interesados enviad sobre franqueado al Liceo, se informará a finales de enero. Precio del viaje en avión unas 45.000 pts aproximadamente.